

14 REKORDO

"Sinjoro distriktestro," raportis ĝendarmo Hejda al distrikta juĝisto Tuček, "mi havas ĉi tie unu pezan korpolezon. Damne, kia varmego!" "Nur, homo, komfortigu vin," konsilis al li sinjoro juĝisto. Sinjoro Hejda starigis fusilon en angulon, ĵetis kaskon sur teron, disbukis rimenon kaj disbutonis jakon. "Uf," li diris. "Damna ulaĉo! Sinjoro juĝisto, tian kazon ankoraŭ mi ne havis. Rigardu nur." Post tiuj vortoj li levis ion pezan, ligitan en blua poŝtuko, kion li antaŭe kuŝigis apud la pordo, malligis nodetojn kaj elpakis ŝtonon grandan kiel la homa kapo. "Nur rigardu tion," li ripetis insiste. "Kion kun tio?" demandis sinjoro juĝisto, fositante tiun ŝtonon per kraĵono. "Ĝi estas fumkvarco, ĉu?" "Estas, kaj ega peco," konfirmis sinjoro Hejda. "Do mi raportas, sinjoro juĝisto:

Lysický Venceslao, brikfareja laboristo, dek naŭjara, loĝanta en brikejo, ĉu notite? frapegis aŭ batis per la almetita ŝtono, pezo kvin kilogramojn naŭcent kvardek naŭ gramojn, Franciskon Pudil, bienulon, Dolní Újezd numero 14, ĉu vi notis? en la maldekstran ŝultron, per kio la sama suferis rompon de artikolo, frakturojn de humero kaj klaviklo, sangantan vundon en humera muskolo, ŝiriĝon de la tendeno kaj de muskol-kapsulo, ĉu notite?" "Notite," diris sinjoro juĝisto. "Kaj kio speciale aparta estas je ĝi?" "Vi mirokulos, sinjoro juĝisto," deklaris sinjoro Hejda emfaze. "Mi rakontos tion al vi laŭorde.

Do pasis tri tagoj, kiam venigis min tiu Pudil. Vi konas lin, sinjoro distriktestro." "Konas," diris la juĝisto. "Foje ni havis lin ĉi tie pro uzuro kaj foje - hm -" "Tio estis kaŭzo de hazardludo. Li estas do tiu Pudil. Sciuj, li havas ĉerizĝardenon ĝis rivero; tie Sázava sinuas kaj tial ĝi estas tie pli larĝa ol aliloke. Tiu Pudil do venigis min matene, ke io okazis al li. Mi trovas lin en lito ĝemeganta kaj insultanta.

14 REKORD

"Pane okresní," hlásil četník Hejda okresnímu soudci Tučkovi, "tak tu mám jedno těžké ublížení na těle. Himl, to je horko!" "Jen si, člověče, udělejte pohodlí," radil mu pan sudí. Pan Hejda postavil pušku do kouta, hodil přilbu na zem, odepjal řemen a rozepjal si kabát. "Uf," řekl. "Zatracený holomek! Pane soudce, takový případ jsem ještě neměl. Tak se podívejte."

Po těch slovech zvedl něco těžkého, zavázaného v modrém kapesníku, co prve nechal ležet u dveří, rozvázal uzlíky a vybalil kámen veliký jako lidská hlava. "Jen se na to podívejte," opakoval důtklivě. "Co má na tom být?" ptal se pan soudce, rýpaje do toho kamene tužkou. "To je bulžník, ne?" "Je, a pořádný kus," potvrzoval pan Hejda. "Tak hlásím, pane soudce:

Lysický Václav, cihlářský dělník, devatenáct let, bytem v cihelně, máte to?, praštil nebo uhodil přiloženým kamenem, váha pět kilogramů devět set čtyřicet devět gramů, Pudila Františka, statkáře, Dolní Újezd číslo 14, máte to?, do levého ramene, čímž týž utrpěl zlomení kloubu, frakturu ramenní a klíční kosti, krvácející ránu v ramenním svalu, přetržení šlachy a svalového pouzdra, máte to?" "Mám," řekl pan soudce. "A co má na tom být tak zvláštního?" "To budete mrkat, pane soudce," prohlásil pan Hejda důrazně. "Já vám to povím po pořádku.

Teda jsou tomu tři dny, co si pro mne poslal ten Pudil. Vy ho znáte, pane okresní." "Znám," pravil soudce. "Měli jsme ho tu jednou skrz lichvu a jednou – hm –" "To bylo za příčinou ferbla. Teda ten Pudil to je. Víte, on má třešňový sad až k řece; ona se tam Sázava kroutí, a proto je tam širší než jinde. Teda ten Pudil si pro mne ráno poslal, že se mu něco stalo. Já ho najdu v posteli, jak heká a nadává.

Laŭdire li iris hieraŭ vespere en la fruktoĝardenon por rigardi la griotojn, kaj tie li kaptis sur arbo iun bubon ŝtopanta siajn poŝojn per ĉerizoj. Sciu, li estas, tiu Pudil, iom krudulo; li do disbukis rimenon, retiris la bubon je la piedo de sur la arbo kaj bategas lin per rimeno.

Kaj tiam iu sur la alia bordo vokas je li: "Pudil, lasu la bubon!" Tiu Pudil iom malbone vidas, mi opinias, ke ĝi estas de la trinkado; li ekvidis nur, ke sur la alia bordo iu staras kaj rigardas lin. Tial nur pro certeco li diris: 'Tio ne rilatas cin, kanajlo,' kaj bategis la bubon des pli. 'Pudil,' ekkriegis tiu homo sur la alia bordo, 'lasu la bubon, jes?' Pudil pensis, kion ci povas fari al mi, kaj tial nur kriis: 'Enrampu al mi ien, ci imbecilo!' Apenaŭ li tion diris, jam li kuŝis sur la tero kun terura doloro en la maldekstra ŝultro; kaj tiu homo sur la alia bordo diris: 'Jen ci havas, ci bruto bienula!' Aŭskultu, tiun Pudil oni devis forporti, eĉ ne leviĝi li povis; kaj apud li kuŝis tiu ĉi ŝtono. Ankoraŭ nokte oni veturis por doktoro; la doktoro volis Pudilon enhospitaligi, ĉar li havas ĉiujn ostojn kaĉigitajn; laŭdire la maldekstra mano restos paralizita. Sed tiu Pudil nun dum la rikoltado ne volas en la hospitalon. Do matene li venigis min, ke tiun mizeran favulon, tiun bovon, kiu faris tion al li, mi devas aresti. Nu bone.

Aŭskultu, kiam oni montris al mi la ŝtonon, mi restis gapanta; ĝi estas fumkvarco kun ioma pirito, ĝi estas do pli peza, ol ĝi aspektas. Manpesu; nur laŭ palpo mi taksis ĝin je ĉirkaŭ seskilograma - mankas nur kvindek unu gramoj. Mia kara, per tia ŝtono oni devas scii ĵeti. Poste mi iris rigardi la frunktoĝardenon kaj la riveron. Kie estis herbo rulpremita, tie falis Pudil; el tiu loko estis ankoraŭ du metroj al la akvo; kaj la rivero, sinjoro, la rivero estas tie unuavide almenaŭ dek kvar metrojn larĝa, ĉar tie ĝi sinuas. Sinjoro juĝisto, mi komencis krii kaj salti kaj diris, alportu al mi rapide dekokmetran ŝnuron! Poste mi enbatis kejlon sur tiu loko, kie Pudil falis, alligis al ĝi la ŝnureton, senvestiĝis kaj naĝis kun la alia ekstremaĵo de la ŝnuro en la buŝo al la alia bordo. Kaj kion vi dirus, sinjoro distriktestro: tiu ŝnuro apenaŭ sufiĉis al la alia bordo;

Tak prý šel včera večer na sad podívat se na vajksle, a tam vám nacyhtal na stromě nějakého kluka, jak si cpal do kapes třešně. Víte, on je ten Pudil trochu rabiát; tak on si odepjal řemen, stáhl kluka za nohu ze stromu a řeže do něho řemenem.

A vtom na něj někdo z druhého břehu volá: Pudile, nechte toho kluka! On ten Pudil trochu špatně vidí, já myslím, že to je od toho pití; zmerčil jenom, že na druhém břehu někdo stojí a kouká na něj. Proto jen pro jistotu řekl: Co ti je po tom, lumpe, a řezal do kluka tím víc. Pudile, zařval ten člověk na druhém břehu, pusťte toho kluka, jo? Pudil si myslel, co ty mně můžeš udělat, a proto jen křikl: Vlez mně někam, ty troubo! Jen to řek, a už ležel na zemi se strašnou bolestí v levém rameni; a ten člověk na druhém břehu povídal: Já ti dám, ty mamlase statecká! Poslouchejte, oni toho Pudila museli odnést, ani vstát nemohl; a vedle něho ležel tenhle kámen. Ještě v noci jeli pro doktora; doktor chtěl Pudila odvézt do špitálu, protože má všechny kosti na maděru; prý mu ta levačka zůstane chromá. Jenže ten Pudil teď o žních do špitálu nechce. Teda ráno si pro mne poslal, že toho prašivku mizerného, toho vola, co mu to udělal, musím arestýrovat. No dobrá.

Poslouchejte, když mně ukázali ten kámen, zůstal jsem koukat; on je to buližník s nějakým kyzem, takže je těžší, než vypadá. Potězkejte; já jsem jej na omak odhadl na šest kilo – schází jenom jednapadesát gramů. Panečku, s takovým kamenem se musí umět házet. Pak jsem se šel podívat na ten sad a na řeku. Co byla zvalená tráva, tam se svalil ten Pudil; z toho místa byly ještě dva metry k vodě; a řeka, pane, řeka tam je na první pohled dobrých čtrnáct metrů široká, protože se tam kroutí. Pane soudce, já jsem začal křičet a skákat a povídám, přineste mně honem osmáct metrů špagátu! Potom jsem zarazil kolík na to místo, kde se svalil ten Pudil, přivázal jsem k němu ten provázek, svléknu se a plavu s druhým koncem provázku v hubě na druhý břeh. A co byste řek, pane okresní: ten špagát stačil akorát k druhému břehu;

kaj krome ankoraŭ estas plua parto de la digo kaj nur supre estas vojeto. Trifoje mi tion remezuris: de la kejlo ĝis la vojeto, tio estas harprecize dek naŭ metrojn kaj dudek sep centimetrojn."

"Homo, Hejda," diris la juĝisto, "ĉi tio tamen ne estas ebla; dek naŭ metroj, tio ja estas distanco; aŭskultu, ĉu tiu homo staris en akvo, meze de la rivero?" "Ankaŭ venis al mi tiu ideo," diris sinjoro Hejda. "Sinjoro distriktestro, de unu bordo al la alia estas profundo pli ol dumetra, ĉar tie estas ia sinuo. Kaj post la ŝtono restis ankoraŭ kaveto en la digo; sciu, la alian bordon oni iom pavimis, por ke la akvo ĝin ne kavigu tie. Tiu homo elrompis la ŝtonon el la digo kaj povis ĝin ĵeti nur de sur la vojeto, ĉar en la akvo li ne povus stari kaj sur la digo li deglitis. Tio do signifas, ke li ĵetis dek naŭ entjerojn dudek sep centonojn de metro. Ĉu vi scias, kio ĝi estas?" "Eble li havis ĵetilon," opiniis la juĝisto necerte. Sinjoro Hejda lin riproĉe ekrigardis. "Sinjoro distriktestro, neniam vi pafis el ĵetilo, nu jes. Do provu pafi el ĵetilo dekdufuntan ŝtonon; vi devus havi katapulton. Sinjoro, kun tiu ŝtono mi penegis du tagojn; mi provis fari ian maŝon kaj rotaciigi ĝin, sciu, same kiel ĉe martel-ĵetado; mi diras al vi, ĝi elglitas el ĉiu maŝo. Sinjoro, tio estis neta globo-ĵeto. Kaj ĉu vi scias," li ekvortis ekscitite, "scias vi, kio ĝi estas? Tio estas mondrekordo. Do."

"Pa, ne diru," miregis sinjoro juĝisto. "Mondrekordo," ripetis ĝendarmo Hejda solene. "Ĵetglobo estas pli peza, ĝi pezas sep kilogramojn; kaj la nunjara rekordo per ĵetglobo estas dek ses metrojn sen ia centimetro. Dum dek naŭ jaroj, sinjoro, estis rekordo dek kvin kaj duono de metroj; nur nunjare iu amerikano, kiun nomon li nur havas, iel kiel Kuck aŭ Hirschfeld, ĵetis preskaŭ dek ses. Ĉe la seskilograma globo ĝi povus do fari dek ok aŭ dek naŭ metrojn. Kaj ni havas ĉi tie je dudek sep centonoj pli! Sinjoro distriktestro, tiu ulo ĵet-atingus per ĵetglobo certe dek ses kaj kvaronoj sen la trejnado! Jesuo Kristo, dek ses metrojn kaj kvaronoj!"

a to jeŝte pak priĵde kus hráze a teprve nahoře je cestička. Já jsem to tříkrát přeměřil: od toho kolíku na tu cestičku, to je navlas devatenáct metrů a dvacet sedm centimetrů."

"Človče, Hejdo," řekl soudce, "tohle snad není možné; devatenáct metrů, to je nějaká dálka; poslouchejte, nestál on ten člověk ve vodě, jako uprostřed řeky?" "To mě taky napadlo," pravil pan Hejda. "Pane okresní, od jednoho břehu k druhému je hloubka přes dva metry, protože tam je takový zákrut. A po tom kameni zbyl jeŝte dolík v hrázi; víte, ten druhý břeh tak trochu vydláždili, aby to tam nebrala voda. Ten člověk vytrhnul ten kámen z hráze a mohl jej hodit jenom z cestičky, protože ve vodě by nestačil a na hrázi by sklouzl. To teda znamená, že hodil devatenáct celých dvacet sedm setin metru. Víte, co to je?" "Třeba měl prak," mýnil soudce nejistě. Pan Hejda na něho vyčítavě pohleděl. "Pane okresní, vy jste nikdy neházel z praku, že jo. Tak to zkuste vystřelit z praku dvanáctiliberní kámen; to byste musel mít katapult. Pane, já jsem se s tím kamenem děl dva dny; zkoušel jsem udělat nějakou smyčku a roztočit jej, víte, jako při vrhu kladivem; já vám říkám, to vám vyklouzne z každé smyčky. Pane, to byl čistý vrh koulí. A víte," vyhrkl rozčileně, "víte vy, co to je? To je světový rekord. Tak."

"Ale dejte pokoj," užasl pan soudce. "Světový rekord," opakoval četník Hejda slavnostně. "Ona závodní koule je těžší, váží sedm kilo; a letošní rekord v závodní kouli je šestnáct metrů bez nějakého centimetru. Devatenáct let, pane, byl rekord patnáct a půl metru; až letos jeden Američan, jakpak on se jmenuje, nějak jako Kuck nebo Hirschfeld, hodil skoro šestnáct. Tak to by při šestikilové kouli mohlo dělat osmnáct nebo devatenáct metrů. A my tady máme o dvacet sedm setinek víc! Pane okresní, ten chlap by dohodil závodní kouli dobrých šestnáct a čtvrt, a bez treningu! Ježíšikriste, šestnáct a čtvrt metru!"

Sinjoro juĝisto, mi estas malnova ĵetisto; en Siberio ĉiam la knaboj vokis, Hejda, ĵetu ĝin tien - nome mangrenadon, sciu? Kaj en Vladivostoko mi ĵetadis kun usonaj maristoj; mi ĵetatingis per ĵetglobo dek kvar, sed ilia kapelano faris je kvar poentoj pli. Miadio, ni en Siberio, kiom ni ĵetadis! Sed ĉi tiun ŝtonon, sinjoro, mi ĵetis nur dek kvin metrojn kaj duonon; pli mi ne kapablis. Dek naŭ metrojn! tondro al tio, mi diris al mi, tiun ulon mi devas akiri; li faros al ni rekordon. Imagu, senigi Amerikon je la rekordo!"

"Kaj kion kun tiu Pudil?" objetis la juĝisto. "Diablo prenu Pudilon," ekkriis sinjoro Hejda. "Sinjoro juĝisto, mi komencis serĉadon pri nekonata farinto de la mondrekordo, tio estas nacia intereso, nu? Unue do mi garantiis al li senpunecon pro tiu Pudil." "Nu, nu," protestis la juĝisto. "Atendu; mi garantiis al li senpunecon, se vere li ĵetos per seskilograma ŝtono trans Sázavan. Al najbaraj vilaĝestroj mi klarigis, kia glora ago ĝi estas kaj ke oni skribus pri ĝi en la tuta mondo; kaj mi diris, ke tiu ulo gajnus per tio multajn milojn. Jesuomaria, sinjoro juĝisto, ekde tiu momento ĉiuj junuloj el la tuta ĉirkaŭaĵo lasis la rikoltadon kaj kuregis tien al la digo, por ĵetadi ŝtonojn sur la alian flankon. Tiu digo estas jam plene diserigita; nun ili disbatas ĉiun limŝtonon kaj malkonstruas ŝtonmurojn, por povi per io ĵetadi. Kaj la buboj, la friponaro, ĵetas ŝtonojn en la tuta vilaĝo; kiom da mortigitaj kokinoj jam tie estas - Kaj mi staras sur la digo kaj inspektas; memkomprene, neniuj ĵetas pli malproksimen ol proksimume mezen de la rivero - sinjoro, tiu fluejo estas, mi opinias, per la ŝtonoj jam duone ŝtopita.

Hieraŭ do antaŭ vespero oni alkondukis al mi junulon, laŭdire li estas tiu, kiu per la ŝtono batvundis tiun Pudil. Lin, tiun klabulon, vi vidis, li atendas ekstere. 'Aŭskultu, Lysický,' mi diras al li, 'do ci ĵetis per ĉi tiu ŝtono je Pudil?' - 'Jes,' li diras, 'Pudil insultis min, kaj mi ekkoleregis, kaj alia ŝtono ĝuste tie ne estis - 'Do jen alia tia ŝtono,' mi diras, 'kaj nun ĵetu sur la bordon de Pudil; sed se ci ne ĵetatingos, ci ekscesulo, mi ŝvitigos cin!'

Pane soudce, já jsem starý vrhač; na Sibíři, to vždycky kluci volali, Hejdo, hod' to tam – totiž ruční granát, víte? A ve Vladivostoku jsem házel s americkými mariňáky; já jsem dohodil závodní kouli čtrnáct, ale jejich kaplan udělal o čtyři body víc. Hergot, my jsme se něco na Sibíři naházeli! Ale tenhle kámen, pane, jsem hodil jenom patnáct a půl metru; víc jsem ze sebe nedostal. Devatenáct metrů! hrom do toho, řekl jsem si, toho chlapa musím dostat; ten nám udělá rekord. Představte si, vyfouknout Americe rekord!"

"A co s tím Pudilem?" namítl soudce. "Čert vem Pudila," křikl pan Hejda. "Pane soudce, já jsem zahájil pátrání po neznámém pachateli světového rekordu; to je národní zájem, no ne? Tak nejdřív jsem mu zaručil beztrestnost za toho Pudila." "Nono," protestoval soudce. "Počkejte; zaručil jsem mu beztrestnost, když opravdu dohodí šestakilovým kamenem přes Sázavu. Okolním starostům jsem vyložil, jaký to je slavný výkon a že by se o něm psalo v celém světě; a řekl jsem, že by ten chlap na tom vydělal hromadu tisíc. Ježíšmarjá, pane soudce, od té chvíle všichni mládenci z celého okolí nechali žní a hnali se tam na tu hráz, aby házeli kamením na druhou stranu. Ta hráz už je úplně rozebraná; teď roztloukají kdejaký mezník a bourají kamenné zdi, aby měli čím házet." A kluci, pakáž jedna, házejí kamením po celé vesnici; tam vám už je zabítych slepic – A já stojím na hrázi a dohlížím; to se rozumí, nikdo nedohodí dál než asi doprostřed řeky – pane, to koryto bude myslím tím kamením už napůl zanešené.

Tedy včera kvečeru ke mně přivedli mládence, a to prý je ten, co tím kamenem potloukl toho Pudila. Však ho, huncúta jednoho, uvidíte, čeká venku. Poslouchej, Lysický, povídám mu, tak tys hodil tímhle kamenem po Pudilovi? Jo, on povídá, on mně Pudil nadával, a já jsem se dožral, a on tu jiný kámen zrovna nebyl – Tak tady máš jiný takový kámen, já řku, a teď dohod' na Pudilův břeh; ale jestli nedohodíš, ty kujóne, tak ti proženu perka!

Kaj li prenis la ŝtonon - la manaĉojn li havis kiel ŝovelilojn, stariĝis sur la digo kaj celis; mi rigardas, teknikon li havis nenian, stilon nenian, laboris nek per la kruroj, nek per la trunko, kaj bum! li ĵetis la ŝtonon en la akvon proksimume dek kvar metrojn; sciu, tio estas sufiĉe, sed - Bone, do mi montras al li: 'Ci mallertulo, ci devas pozi tiel, la dekstran ŝultron dorsen, kaj kiam ci ĵetas, do samtempe ci devas svingi la ŝultron, komprenite?' - 'Jes,' li post tio, li kurbiĝis kiel sankta Johano Nepomucena kaj bum! ĵetis ŝtonon apenaŭ dek metrojn. Sciu, tio min kolerigis. 'Ci kanajlo,' mi krias, 'ĉu ci ja trafis tiun Pudil? Ci mensogas!' - 'Sinjoro ĉefserĝento,' diras li, 'Dio scias, ke mi lin trafis, Pudil stariĝu tie, denove mi ĵetatingos lin, tiun hundon mavan.' Sinjoro, do mi kuris al Pudil kaj petas, sinjoro Pudil, rigardu, jen temas pri la mondrekordo; mi petas vin, venu denove insulti sur vian bordon, tiu brikisto ĵetos je vi ankoraŭ foje.' - Kaj vi ne kredus, sinjoro juĝisto: tiu Pudil rifuzis tion, ke li ne iros por nenia prezo. Vidu, tiuj homoj havas neniajn pli superajn interesojn. Denove do mi iras al tiu Venceslao, tiu brikisto. 'Ci trompulo,' mi krias je li, 'ne estas vero, ke ci batvundis Pudilon; Pudil diras ke tiu estis iu alia.' - 'Kia mensogo,' diras Lysický, 'tion mi faris.' 'Montru do,' mi diras, 'ĉu vi ĵetos tiel malproksimen!' Tiu Venceslao nur gratas sin kaj ridas: 'Sinjoro ĉefserĝento,' li diras, 'tiel sencele, tion mi ne kapablas; sed tiun Pudil mi trafos ĉiam; je tiu mi koleregas. - 'Venceslao,' mi diras al li mildmaniere, 'se ci ĵetatingos, mi liberlasos cin, se ci ne ĵetatingos, do ci iros sidi pro peza korpolezo, ĉar ci paralizis tiun Pudil; ci ulaĉo, por tio ci ricevos duonjaron.' - 'Tion do mi sidpasigos en vintro,' diris tiu Venceslao kaj mi do arestis lin en nomo de la leĝo.

Nun li atendas en la koridoro; sinjoro distriktestro, se vi nur igus lin konfesi, ĉu vere li ĵetis la ŝtonon, aŭ li nur tiel renomigas sin! Mi opinias, ke li ektimos kaj revokos; poste lin, kanajlon, ŝarĝi almenaŭ per monato pro mistifiko de oficoj aŭ pro trompo; en sporto oni ja ne darfis mensogi, je tio devus esti ega puno, sinjoro. Mi alkondukos lin."

Tak on vzal ten kámen – pracky měl jako lopaty, postavil se na hráz a mířil; koukám, techniku neměl žádnou, styl žádný, nepracoval nohama ani trupem, a plums, hodil kámen do vody asi čtrnáct metrů; víte, je to dost, ale – Dobrá, tak já mu ukazuju: Ty trulante, to se musíš postavit takhle, pravým ramenem dozadu, a když hodíš, tak současně přitom musíš vyrazit tím ramenem, rozumíš? Jo, on na to, zkrřivil se jako svatý Jan Nepomucký, a plums, hodil kámen sotva na deset metrů. Víte, to mě dožralo. Ty lumpe, křičím, ty žes trefil toho Pudila? Ty lžeš! Pane vachmajstr, povídá on, pámbu ví, že jsem ho trefil; ať se tam Pudil postaví, však já na něj zas dohodím, na toho psa zlýho. Pane, já jsem teda běžel za tím Pudilem a prosím, pane Pudile, koukejte se, tady jde o světový rekord; prosím vás, pojd'te zas nadávat na ten váš břeh, on ten cihlář po vás hodí ještě jednou. – A to byste nevěřil, pane soudce: ten Pudil že ne, a že nepůjde ani zanic. Vidíte, tihle lidé nemají žádné vyšší zájmy. Tak jdu zas na toho Vaška, toho cihláře. Ty podvodníku, křičím na něj, to není pravda, žes Pudila pobil; ten Pudil říká, že to byl jiný. To je lež, povídá Lysický, to jsem udělal já. Tak ukaž, povídám, dohodíš-li tak daleko! Ten Vašek se jen drbe a směje: Pane vachmajstr, povídá, takhle naprázdno, to já neumím; ale do toho Pudila trefím dycky, na toho mám dožer. Vašku, říkám mu po dobrém, dohodíš-li, pustím tě; když nedohodíš, tak půjdeš sedět pro těžké ublížení na těle, žes toho Pudila zchromil; ty holomku, za to dostaneš půl roku. Tak to já si odsedím v zimě, řekl ten Vašek; a já jsem ho teda ve jménu zákona zatknul.

Teď čeká na chodbě; pane okresní, kdybyste tak z něho dostal, hodil-li opravdu ten kámen, nebo jestli jen renomíruje! Já myslím, že se lekne a odvolá; ale pak mu, lumpovi, nasolit aspoň měsíc pro klamání úřadů nebo pro podvod; přece ve športu se nesmí lhát, na to by měl být pořádný trest, pane. Já vám ho přivedu.”

"Vi estas do tiu Venceslao Lysický," diris la distrikta juĝisto rigardante severe la palharan deliktulon. "Vi konfesas, ke intencante vundi, vi ĵetis ĉi tiun ŝtonon je Francisko Pudil kaj per tio kaŭzis al li gravan lezon. Ĉu ĝi estas vero?" "Mi petas, sinjoro juĝisto, komencis la deliktulo, "ĝi estis jene: Li, tiu Pudil, bategis tie iun bubon, kaj mi vokis al li trans la riveron, ke li lasu tion kaj li komencis insulti min." "Ĉu vi ĵetis la ŝtonon aŭ ne?" abruptis la juĝisto. "Mi petas, ĵetis," diris la kulpiĝinto pente; "sed li insultis min, kaj tial mi ekprenis la ŝtonon -" "Tondro al vi," ekkriis la juĝisto. "Kial vi mensogas, homo? Ĉu vi ne scias, ke je tio estas granda puno, se vi volas blufi oficojn? Ni scias bone, ke tiun ŝtonon vi ne ĵetis!" "Ĵetis, mi petas," balbutis la juna brikisto; "sed Pudil diris al mi, ke mi enrampu al li ien -"

La juĝisto demande rigardis ĝendarmon Hejda, kiu senkonsile ŝultrolevis. "Senvestigu vin, homo," bruskis la juĝisto je la konsternita kulpulo. "Nu rapide - kaj pantalonon ankaŭ! Ĉu ĝi jam estos?" Nun staris la juna giganto tiel, kiel lin Disinjoro kreis kaj tremis; versimile li timis, ke oni torturos lin, ke tio apartenas al la afero.

"Rigardu, Hejda, tiun deltoïdon," diris juĝisto Tuček. "Kaj la bicepso - kion vi diras al tio?" "Nu tiu estus sufiĉe bona," opiniis sinjoro Hejda eksperte. "Sed la ventro-muskoloj ne estas sufiĉe ekzercitaj. Sinjoro distriktestro, por globo-ĵetado necesas ventraj muskoloj, sciu, turnantaj la trunkon. Se mi montrus al vi miajn ventromuskolojn!" "Homo," murmuris la juĝisto, "kia ventro ĝi estas, rigardu la tuberojn; miadio, kia torako," li diris pikante per fingro la oran lanugon sur brusto de Venceslao. "Sed la kruroj estas malfortaj; la kamparanoj entute havas malbonajn krurojn." "Ĉar ili ne fleksas ilin," diris sinjoro Hejda kritike. "Ja tio estas neniaj kruroj; sinjoro, ĵetisto devas havi kvalitajn krurojn."

"Tedy vy jste ten Václav Lysický," řekl okresní soudce pohlížeje přísně na blondovlasého delikventa. "Vy se přiznáváte, že jste v úmyslu ublížit mu hodil tenhle kámen na Františka Pudila a že jste mu přivodil těžké zranění. Je to pravda?" "Prosím, pane soudce," začal provinilec, "to bylo tak: on ten Pudil tam mládil nějakého kluka, a já jsem na něj volal přes tu řeku, aby toho nechal, a on mně začal nadávat." "Hodil jste ten kámen, nebo ne?" spustil soudce. "Prosím hodil," řekl provinilec zkroušeně; "ale on mně nadával, a tak já jsem popad ten kámen -" "Hrom do vás," rozkřikl se soudce. "Proč lžete, člověče? Nevíte, že na to je veliký trest, když chcete obulíkovat úřady? My víme dobře, že jste ten kámen nehodil!" "Hodil prosím," koktal mladý cihlář, "ale on mně Pudil řekl, abych mu vlezl někam -"

Soudce se podíval tázavě na četníka Hejdu, jenž bezradně pokrčil rameny. "Svlékněte se, člověče," obořil se soudce na zdrceného viníka. "No tak honem, - a katě taky! Bude to?" Nyní stál mladý obr, jak ho pánbůh stvořil, a třásl se; nejspíš se bál, že bude mučen a že to už patří k věci.

"Koukejte, Hejdo, na ten deltoïdes," pravil soudce Tuček. "A ten dvojhlavý sval, - co tomu říkáte?" "No, ten by ušel," mínil pan Hejda znalecky. "Ale břišní svaly nejsou dost vypracované. Pane okresní, na vrh koulí je potřeba břišních svalů, víte, jak se otáčí trup. Kdybych vám ukázal své břišní svaly!" "Člověče," bručel soudce, "vždyť to je břicho, koukejte ty hrboly; hergot, to je hrudník," řekl píchaje prstem do zlatého chmýří Vaškových prsou. "Ale nohy jsou slabé; tihle venkovani mají vůbec špatné nohy." "Protože je neohýbají," pravil pan Hejda kriticky. "Tohle přec nejsou žádné nohy; pane, vrhač musí mít nějaké nohy!"

"Turniĝu," abruptis sinjoro juĝisto la junan brikiston. "Kaj la dorso?" "De la ŝultroj ĝi estas bona," opiniis sinjoro Hejda, "sed malsupre, ĝi estas nenio, tiu ulo havas en la trunko neniun svingimpeton. Mi opinias, sinjoro distriktestro, ke li tion ne ĵetis."

"Do vestu vin," bruskis la juĝisto la brikiston. "Aŭdu, homo, la lasta vorto: ĉu vi ĵetis la ŝtonon aŭ ne?" "Ĵetis," murmuris Venceslao Lysický kun virŝafa obstino. "Vi azeno," ekvortis la juĝisto, "se vi ĵetis la ŝtonon, do ĝi estas peza korpolezo kaj kun tio vi iros al la distrikta tribunalo kaj ricevos kelkajn monatojn, komprenite? Lasu jam la fanfaronadon kaj konfesu, ke tion kun la ŝtono vi elpensis; mi donos al vi nur tri tagojn pro mistifiko de l' oficoj kaj vi povas iri. Do, ĉu vi batis per tiu ŝtono tiun Pudil aŭ ne?" "Batis," diris Venceslao Lysický obstinege. "Li insultis min trans la riveron -" "Forkonduku lin," ekkriegis la distrikta juĝisto. "Damna trompulo!" Post tempeto aperis ankoraŭ foje en la pordo la kapo de ĝendarmo Hejda. "Sinjoro distriktestro," li diris venĝeme, "ankoraŭ necesus lin ŝarĝi pro damaĝo de la fremda posedaĵo; sciu, li eltiris la ŝtonon el la digo kaj nun la digo estas tute disportita."

"Obraťte se," vyjel pan soudce na mladého cihláře. "A co ta záda?" "Tady od ramen to je dobré," mínil pan Hejda, "ale dole, to není nic, ten chlap nemá v trupu žádný švunk. Já myslím, pane okresní, že to nehodil."

"Tak se oblecte," utřhl se soudce na cihláře. "Poslouchejte, člověče, poslední slovo: hodil jste ten kámen, nebo ne?" "Hodil," mumlal Václav Lysický s beraní tvrdohlavostí. "Vy osle," vyhrkl soudce, "hodil-li jste ten kámen, tak to je těžké ublížení na těle a s tím půjdete ke krajskému soudu a dostanete několik měsíců, rozumíte? Nechte už toho naparování a přiznejte se, že jste si to s tím kamenem vymyslel; já vám dám jenom tři dny pro klamání úřadů a můžete jít. Tak co, uhodil jste tím kamenem toho Pudila, nebo ne?" "Uhodil," pravil Václav Lysický zarytě. "On mně přes tu řeku nadával -" "Odveďte ho," zařval okresní soudce. "Zatracený švindlěť!" Za chvílku vstrčil ještě jednou hlavu do dveří četník Hejda. "Pane okresní," řekl mstivě, "takhle mu dát ještě poškození cizího majetku; víte, on vytáhl kámen z té hráze, a teď je ta hráz celá rozebraná."